

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**



EKO 2023 / 09. Februaro 9, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Volontuloj por Torino

Se vi pretas kunlabori kiel volontulo por la 108-a Universala Kongreso, kiu okazos en Torino (de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto), anoncu vin pere de la volontula formularo: mallonge.net/volontuloj2023.

Subvencio por ĉeesti la UK-on estas havebla danke al la fondaĵo "Partoprenu UK-on". Pere de ĝi UEA havas la eblon subteni ĉefe la aliĝkotizon de kelkaj kongresanoj, en kelkaj kazoj ankaŭ la manĝo- kaj loĝado-kostojn, preferinde en la plej malaltaj kategorioj, kaj en esceptaj kazoj la vojaĝkostojn. Homoj el iu ajn lando, kiuj deziras volontuli kaj bezonas tian helpon, povas kandidatiĝi por subvencio.



Jen la kondiĉoj por kandidatiĝi:

1) Esti preta ricevi kaj realigi kongresrilatajn taskojn antaŭ, dum kaj post la UK;

2) Plenigi la formularon (mallonge.net/volontuloj2023) ĝis la **LIMDATO: 19.02.2023**.

En pasintaj UK-oj volontuloj helpis ĉefe pri fotado, filmado, helpoj en prelegejoj (teknika kaj kunordiga) kaj en la Libroservo de UEA, sed la taskoj povas esti tre variaj. En la

formularo vi havas la eblon prezenti por kiu(j) tasko(j) vi pli emas helpi.

UEA dankas al ĉiuj pro la intereso pri tiu subteneblo kaj varme invitas donacemulojn al kontribuo al Fondaĵo "Partoprenu UK-on", kiu helpas diversiĝi kaj demokratiigi nian plej gravan kongreson: uea.org/alighoj/donacoj/partoprenu_uk.

Krome UEA profitas la okazon por memori, ke la 2-a aliĝperiodo de la UK daŭros ĝis la 31-a de marto 2023. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ne mistrafu la okazon facile kaj naturamike aliĝi per nia reta aliĝilo kaj helpi disvastigi tiun informon: uea.org/alighoj/uk_alighilo.

UEA, nome de la monda esperantistaro, kore dankas la volontulojn pro la sindonemo kaj donacantojn pro la solidareco kaj malavareco favore al la Fondaĵo "Partoprenu UK-on".

Temo por la UK en Torino: 'Migrado'

La preciza temo estas 'Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj'. En ĉiuj epokoj de la historio homoj migris de unu regiono al alia, de unu lando al alia – ĉu por trovi lokon por kulturi teron kaj nutri sian familion, ĉu – en la nuntempo – por studi aŭ labori. Homoj kun diversaj kulturaj fonoj, kun diversaj gepatraj lingvoj kunvivas en sama loko, tiel homaj valoroj kunfluas kaj kontribuas al la pluevoluigo de socioj. Migrado estas inspiro, ne nur por la homoj, kiuj migras, sed ankaŭ por tiuj, kiuj renkontos la migranton kiel novan najbaron.

Multaj esperantistoj riĉigis siajn vivojn per propra migrada sperto. Jam la eklerno de la internacia lingvo Esperanto estas unua paŝo por esti preta renkonti homojn kun alia gepatra lingvo, alia kultura fono. Kelkaj esperantistoj elektis vivi en aliaj landoj kaj mem fariĝi parto de la socio kaj kulturo de la nova lando.

Samtempe, pli kaj pli ofte homoj estas devigataj forlasi sian hejmon. Ili fariĝas migrantoj kontraŭvole – pro milito, pro mizero, pro danĝero. Ili ne povas resti en siaj hejmlokoj, sed devas fuĝi. En la jaro 2022 la nombro de rifuĝintoj tutmonde unuafoje superis cent milionojn, laŭ la statistiko de la UN-suborganizo por rifuĝintoj, UNHCR.

Tiujn temojn ni diskutos dum la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023. La urbo Torino estas taŭga gastiganto por tiu Kongresa temo – en Torinon enmigris miloj da homoj por labori en la industriaj produktoj. Ni lernos pri la situacio de enmigrantoj en Torino kaj en Italio en la pasinteco kaj en la nuntempo. Ni studos la fenomenon de migrado en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: Migrado ĉiam estis fonto de evoluo kaj progreso: migrado de plantoj, de bestoj, de homoj. Kaj fine, ni intencas analizi, kiun rolon ludu la Esperanto-movado por solvi problemojn estiĝantajn pro migrado aŭ por migrantoj.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn lertaj aŭ spertaj pri la temo "migrado" kontribui al la programo. Eble vi mem migris al alia lando kaj pretas raporti pri viaj spertoj. Aŭ vi subtenas migrantojn kiuj venis al via mondoparto kaj vi pretas dividi tiujn viajn spertojn kun la kongresanoj. Reĝisoro de la Kongresa temo estas Thomas Bormann, ĵurnalisto el Germanio, esperantisto de post la 70-aj jaroj. Bormann vivis dum pluraj jaroj en Turkio kaj en Grekio por raporti el tiuj landoj por germana radio-reto "ARD". Por kontakti la reĝisoron pri la kongresa temo, skribu al KongresaTemo@groups.io – interesatoj ankaŭ povas aktive partopreni la [diskutliston](#).

Ĉiuj estas invitataj aliĝi al la 108-a UK per reta aliĝo: uk.esperanto.net/2023 antaŭ la fino de la dua aliĝperiodo je la 31-a de marto 2023.

Estrarano de UEA volas kontribui al la temo

Mi estas Jeremie SABIYUMVA, estrarano de UEA pri Afriko kaj AMO. Mi loĝas en Burundo, Afriko. La kongrestemo ege interesas min, kaj mi forte deziras kontribui. Miaj gepatroj migris al DR Kongo en 1972, kaj mi naskiĝis tie. Ni revenis al Burundo kiam mi estis 3-monata. En 1994, mi migris/fuĝis al DR Kongo post la murdo de la Burunda Prezidento. Mi havas plurajn spertojn pri migrado, kiujn mi ŝatus dividi kun kongresanoj.

Ondas informoj pri la UK 2023

La 1-an de februaro 2023 al la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2023 en Torino (Italio), aliĝis 772 personoj el 51 landoj, je 92 pli multe ol antaŭ tri semajnoj. Plej multaj aliĝintoj estas el Francio (130), Germanio (79) kaj Italio (74). Vidu la laŭlandan plejliston en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2023/02/torino-6/>

Brazilo kaj Francio okazigas pliajn kursojn

De: [edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net) <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso de Esperanto B1-B2
Gvidantonomo: Aristóphio Andrade Alves Filho
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Maceió, Brazilo
Aldoninto: esperantomaceio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27511>

Nomo: KULTURA SEMAJNFINO en LA GARDE
Gvidantonomo: Katalin Kovats
Tipo: Nova movada kurso
Loko: La Garde (apud Tulono, Francio)
Aldoninto: Katalin

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27512>

Reaperas 'La merkato' – IKEF laboras

Dank' al granda laboro de John Huang, la redaktoro de "La Merkato", IKEF reeldonas la revuon oficialan de nia federacio! Ni alkroĉas ĝin.

Ĉe nia retpaĝaro la revuon ankaŭ eblas elŝuti, dankon!

N.101 estas senpage disponebla, do bone gustumu ĝin, karaj... bonan apetiton!

Yass Kawamura: VicPrez. de IKEF por retaranĝoj

Libro de Etsuo Miyoshi en la franca kaj germana

La japano Etsuo Miyoshi en decembro publikigis libron pri siaj vivo kaj pensoj, en kiu li parolas ankaŭ pri Esperanto. La libro jam aperis en la japana originalo kaj en franca kaj germana tradukoj; angla traduko survojas. La libro estas ofertata en elektronika versio (Kindle) kaj estas senkoste elŝutebla/pruntebla, se oni petas provabonon de Kindle ĉe Amazon. La unua monato de la abono estas senkosta. Se oni ne volas daŭrigi la abonon pli longe, oni devas malaboni ene de 30 tagoj.

La franca eldono estas ofertata ĉe

<https://www.amazon.fr/poliomy%C3%A9lite-ouvert-monde-paix-durable-ebook/dp/B0BS3VXRFM/>

Ma poliomyélite m'a ouvert le monde à une paix durable;

La germana versio troveblas ĉe

<https://www.amazon.de/Meine-Kinderl%C3%A4hmung-%C3%B6ffnete-anhaltendem-Frieden-ebook/dp/B0BQBK863L/>

Meine Kinderlähmung öffnete die Tür zu anhaltendem Frieden

Tie eblas ankaŭ ĵeti rigardon al trideko da paĝoj de la libro.
Ĉu eble vi ŝatos verki recenz(et)on pri la libro? Certe Etsuo Miyoshi multe ĝojos pri
recenzoj de legantoj ĉe Amazon. Skribu, kion vi opinias.

Lu Wunsch-Rolshoven

Ondo kun Voltero

Ĵus aperis, kiel literatura suplemento al “La Ondo de Esperanto” por la 2022-a jaro,
la romano de Voltero “Kandido, aŭ Optimismo” (176 paĝoj) en nova traduko de
akademiano Sergio Pokrovskij kun lia ampleksa postparolo.

Legu pli en nia novaĵretejo <https://sezonoj.ru/2023/01/ondo-108/>

**INTERNACIA TAGO
DE LA
GEPATRA LINGVO
21-A DE FEBRUARO 2023**

www.uea.org

"Ni devas defendi ...
la indiĝenajn lingvojn,
pri kiuj ni scias, ke ili
malaperas laŭ la ritmo
de po unu ĉiujn du
semajnojn - kio estas
neriparebla perdo por
la homa heredaĵo."
Generala Direktoro, UNESCO

**Ĉiu popolo, ankaŭ
la indiĝenaj popoloj
rajtas paroli
sian gepatran lingvon.**

Ŝtatoj permesu kaj favoru tion okaze de la
Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj
2022 - 2032

Por interpopolaj rilatoj oni uzu la
neŭtralan lingvon:
Esperanto - www.esperanto.net

Ni festu la internacian tagon de la gepatra lingvo

Trovu la alilingvajn versiojn ĉe
<http://www.linguistic-rights.org>

La afiŝo estas prizorgata de la informa fako de
UEA: ZPI.

===== vortoj: 1240 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj
instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj
de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus
plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La
prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj
enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj
Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu via